por ĉio, kio estas necesa, ke duobla organizo ofte kreas malkonkordon. La anoj de la dua sistemo diris, ke Esperanto estas internacia lingvo kaj ke ĝia uzo devas esti organizata en la internacia vivo en maniero laŭeble tute ignoranta la landlimojn.

Sperto de multaj jaroj montris, ke ambaŭ vidpunktoj estas parte pravaj. Kie nacia Esperanto-asocio estas efike organizita, kie ĝi estas demokrata rilate al la membroj kaj sendependa rilate al politikaj influoj, la neceseco de duobla organizo ne ekzistas. Tamen estas fakto, ke la cirkonstancoj ne ĉiam estas tiaj. Kelkaj legantoj rememoros la tempon, kiam la faŝista reĝimo en Italujo kaj la Hitler-reĝimo en Germanujo influis ne nur la naciajn Esperanto-asociojn en tiuj landoj, sed nerekte la internacian organizon. Ankaŭ en aliaj landoj, ekz. Aŭstrujo, Hungarujo, Hispanujo, Japanujo, politikaj influoj kelkfoje rekte aŭ nerekte regis laŭdire "neŭtralajn" Esperanto-asociojn. Ekzistis kaj ekzistas ankaŭ landoj, kie la naciaj Esperanto-asocioj funkcias malbone aŭ troviĝas en la manoj de malgranda diktatora aŭ preskaŭ diktatora grupo. En tiaj kazoj la ekzisto de "kontraŭpezo" estas utila.

La nova organiza sistemo de UEA kunigas la avantaĝojn de la du principoj. La Komitato de UEA konsistos el tri kategorioj de membroj: 1. membroj nomitaj de la naciaj organizoj (kiel ĝis nun en IEL), 2. membroj elektitaj de la Delegitoj el internacia listo (po unu por 250 Delegitoj). 3. membroj elektitaj de la aliaj komitatoj pro ilia speciala kompetenteco, ĝis maksimumo de triono de ilia nombro (kvarumono de la tuta nombro).

La Centraj Oficejoj en Rickmansworth, Britujo, (IEL), kaj en Ĝenevo, Svisujo, (UEA), dividos la laboron inter si en maniero jene priskribita de S-ro Hans Jakob en N-ro 498 de "Esperanto": "La gvido apartenas al la naciaj organizoj. Kun la gvido ĝenerala

estas ligataj la administrado kaj la financoj. Ĉio tio koncentriĝas en la oficejo en Britujo. . . La korelativo estas la Servoj. Ilin starigas, prilaboras kaj gvidas la centro en Svislando, laŭ la ekzistantaj rimedoj. Ĝi redaktas la gazeton 'Esperanto' laŭ la ĝisnunaj tradicio kaj tendenco. La kontraŭpezo de la nacia elemento estas la Delegitoj, kiuj devos reprezenti la servadon. La malsama maniero, sendi anon en la Komitato, dokumentas la malsamecon de la elementoj. Resume oni povus diri, ke tiu ĉi Akordo estas ia 'balance of power', t. e. pezegaligo de la fortoj."

La nova mondorganizo, kiu portas la gloran nomon de Universala Esperanto-Asocio, signifas novan epokon en la historio de nia movado. UEA baldaŭ estos 40-jara; ĝi ja fondiĝis la 28an de Aprilo 1908. La fondintoj kaj pioniroj de UEA, Hector Holder, Edmond Privat, Eduard Stettler, Théodore Rousseau, sukcese laboris por fari el Esperanto instrumenton de praktika servado kaj de internacia solidareco. Ni plene utiligu la spertojn kaj tradiciojn de tiu 40-jara historio. Aliflanke la estroj de IEL montris grandan administran kapablecon kaj gajnis bonan reputacion de persista, fidinda, akurata laborado. La Esperantistaro certe ankaŭ neniam forgesos, ke la efektiva daŭrigo de internacia Esperanto-laboro tra la malfacilaj jaroj de la dua mondmilito estas preskaŭ tute dankata al la sindono de la britaj samideanoj kaj de la IEL-Oficejo en Rickmansworth. IEL en tiu tempo estis savata per la financa kaj morala subteno de la brita movado, subteno speciale admirinda pro la teruraj

cirkonstancoj de tiuj malhelaj tagoj, malhelaj por la Esperanto-movado, por Britujo kaj por la mondo.

Ni esperu, ke la nova UEA baldaŭ atingos kaj superos la forton de la malnova UEA, kiu antaŭ 20 jaroj havis 9,100 individuajn membrojn kaj eldonis jarlibron pli ol 600-paĝan.

Krom la publikigo de utila Jarlibro kaj impresa gazeto, UEA devos ankaŭ repreni la agadon de la estinta Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado, klopodante pri la enkonduko de Esperanto en internaciajn organizojn, pri la internacia diskonigo de informoj pri Esperanto al organizoj kaj eminentuloj diversspecaj, pri la organizo de fakaj konferencoj, la plibonigo de la Universalaj Kongresoj kaj multaj aliaj aferoj, kiuj ne devus esti lasataj al nura privata aŭ nacia klopodado.

Ni Esperantistoj forgesu la disputojn de pasintaj tempoj kaj komencu novan paĝon en la libro de nia internacia movado. "Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante ni iru la vojon celitan". Ni venigu en nian organizon almenaŭ parton de la multaj Esperantistoj, kiuj nun ne estas membroj. Ni kreu pli densan reton de UEA-Delegitoj kaj varbu pli grandan nombron da individuaj membroj. Ni plifortigu nian nacian organizon, la Esperanto-Asociacion de Nord-Ameriko, por ke ĝi povu pli efike kunlabori kun la internacia organizo. Ni ne malŝparu energion por internaj disputoj, sed uzu energion, monon, tempon kaj organizan talenton por granda ofensivo por la praktika uzo de Esperanto en la internacia vivo.

—W. S.

### Bona kaj Malmultekosta Esperanto-Libro

ESPERANTISMO, de I. Gomes Braga, estas facile legebla libroto pri diversaj kaj interesaj temoj: "La Malpermeso", "Dum la Milito" "Rotary Club Atendas Novan Lingvon!", "Tutamerikanismo", "Fino Tappan Vizitas Nin", "Religiaj Lingvoj", "La Naskiĝa Datreveno de Nia Majstro", k.t.p. Mendu ĝin por legado en stud-rondoj, aŭ por persona profito pro la interesaj temoj kaj la bonega Esperanto-stilo. 10 ekz. \$1.00; unu ekz. nur .15c.

# FABELO PRI LA VEKHORLOĜO

JENÖ HELTAI

*El la hungara: LADISLAO SOMLAI (SPIERER)*

Ĉe la tagiĝo de mia juno—kiel ĉiu honesta homo—ankaŭ mi havis loĝejon en la periferio. Ĉe sinjorino vidvino Horničak, en monata ĉambro, en la strato Strigo.

Kiam mi enloĝiĝis, sinjorino Horničak starigis vekhorloĝon, sur la noktan ŝrankon apud mia lito.

“Jen rigardu ĉi tiun vekhorloĝon,” ŝi diris fiere, “ĝi funkcias kvazaŭ fulmotondro, kaj tiktakas kvazaŭ kanono.”

Vere, la horloĝo precize plenumis sian devon. Ĉiumatene ĝi volis min vekti, sed ke ĝi tamen ne vekis min, pro tio estis kulpa mi kaj ne la horloĝo. Ĝi ĉiam vekis min tiam, kiam mi jam sidis en la kafejo.

Post la kvara aŭ kvina tago de mia enloĝiĝo sinjorino Horničak ekscitite venis al mi.

“Malbone vi manipulas la horloĝon. Ĝi difektiĝis. Ĝi devas esti riparota.”

Mi rigardis la horloĝon. Vere, ĝi havis ian sekretan malĝojon. Ĝi staris malgaja, ĝiaj montriloj ne moviĝis. Vane mi skuis ĝin, ĝi nur ne volis ekfunkcii.

“Bone. Bonvolu porti ĝin al la horloĝisto kaj riparigu ĝin!”

La horloĝisto loĝis en la domo kaj li fajfis la tutan tagon. Li ne havis alian laboron, ĉar en la strato Strigo la horloĝoj nur unufoje defektiĝas, sed tiam poreterne.

La alian tagon la horloĝo estis preta. Denove ĝi funkciis, kvazaŭ fulmotondro, kaj tiktakis kvazaŭ kanono. Mi pagis tri kronojn por la riparigo. Dum ses tagoj laboris la horloĝo, sed dum la sepa ĝi ekripozis. Ĝi haltis kaj vane mi skuis ĝin, ĝi ne volis plu funkcie. Kaj kiam mi volis penetri

en ĝian internon per la ŝubutonumilo, ĝi grincis tiel minace, ke time mi ĉesigis la intimon.

Mi alvokis sinjorinon Horničak.

“Jen, la horloĝo jam denove difektiĝis.”

“Aj, aj,” diris la vidvino, “kian difekton ĝi povas havi?”

Kaj kapbalance ŝi portis ĝin al la horloĝisto.

Nun mi pagis kvin kronojn por la riparigo, ĉar la horloĝo estis eĉ pli difektita. Sed almenaŭ denove ĝi bone funkciis. Mi konfesas, ke mi atendis la fatalan semajnon kun ioma maltrankvilo, sed ĝi forpasis sen malagrablo je mia granda ĝojo. La fatalo atingis la horloĝon nur dum la naŭa tago kaj tiam haltis ambaŭ. Tiel la fatalo, kiel la horloĝo.

Mi iris en la korton kaj vizitis la horloĝiston, kiu laŭkutime gaje fajfis.

“Kara sinjoro horloĝisto,” mi diris afable, “kio okazis al tiu ĉi freneza horloĝo? Ĝi jam denove difektiĝis.”

“Pri kia horloĝo vi bonvolas paroli?” demandis la horloĝisto suspekteme.

“Pri mia. Jam dufoje vi riparis ĝin!”

“Ĉu mi?”

La okuloj de la horloĝisto pleniĝis per larmoj.

“Sinjoro, je mia horloĝista honesto min diras al vi, ke mi ne riparis horloĝon, depost la diluvo.”

Kaj larmante li fajfis plu.

Jen la historio. La vidvino manipulis per du samaj vekhorloĝoj, per unu bona kaj per unu malbona. Tiujn du ŝi interŝanĝadis sur mia nokta ŝranko. Kaj ankaŭ sur tiu de la aliaj loĝantoj. Baldaŭ ŝi aĉetis domon en la centro de la urbo kaj edziniĝis al la horloĝisto.

---

DEZIRAS KORESPONDI: Jozef Hiller, Malinovskij-str. 31, Zlaté Moravce, Ĉekoslovakio, dez. kor. kaj interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn, kaj diversajn objektojn kun amerikanoj.

“MIA INFANINETO”

Esperanto-farso — iom serioza

R. EDIS FAIRBAIRN

(*Alvenas dolormiena sinjorino, rigardas dekstren, maldekstren, kelkfoje viŝas la okulojn per postuko, murmuras*): Mi ne povas trovi mian infanineton. Ho ve! (*ploras*)

(*Alvenas sinjoro de kontraŭa direktoro, rimarkas ke la sinjorino estas tre malĝoja, diras*): Pardonu, sinjorino, verŝajne io ĝenas vin. Ĉu eble mi povus helpi vin?

*S-ino*: Ho jes, ja mi estas tre malfeliĉa. Mi perdis mian infanineton. Ho ve!

*S-ro*: (*simpatie*) A-a-h! La kompatinda karulineto! Ĉu ŝi forvagus dum ludado?

*S-ino*: (*multe ploras*) Ve al mi! Ne! Mia infanineto ne estas vere infanineto. Mi nur uzas la “eton” ... kiel aman finaĵon ... kaj ne ... kiel signifon de grandeco.

*S-ro*: Do, eble ŝi kapablas demandi pri la vojo al la hejmo, ĉu ne?

*S-ino*: Nu, jes ... mi opinias ... ke ŝi kapablas ... demandi pri la vojo al la hejmo ... jam de dudek jaroj. Ho ve!

*S-ro*: A-a-h! Do, ŝi estas maturaĝulo, saĝne.

*S-ino*: Jes, certe, ... mia infanineto.

*S-ro*: (*levas okulbrovojn*) Pli serioza afero! Ja, tute serioza!

*S-ino*: (*iom indigne*) Certe, certe, ĉu mi ne jam diris tion?

*S-ro*: Dudekjara! Do, sufiĉe aĝa por la amaj aferoj, ĉu ne? Eĉ povas esti ke ŝi forkuris por edziniĝi.

*S-ino*: (*fokite*) Ho ne ... ne ... mia kara infanineto! Ne tia katastrofo!

*S-ro*: Nu, do ... tamen ... estas natura afero ... vi scias ke gejunuloj sentas sin reciproke altirataj ... vi mem scias kiel afero okazas ... vi mem estas edzino ...

*S-ino*: Ne, mi estas vidvino ... sed tamen honesta, mi volas informi vin, sinjoro!

*S-ro*: Ho, kompreneble, kompreneble!

*S-ino*: (*ree ploras*) Tamen mi perdis mian infanineton ... kaj ne scias kion fari. (*uzas postukon*)

*S-ro*: (*konsile*) Ĉu ŝi ne havas amikojn kun kiuj ŝi eble farus piknikon, aŭtomobilon veturadon aŭ alian? La gejunuloj nuntempaj iafaje faras petolaĵojn, vi scias.

*S-ino*: Ja, ŝi havas multe da amikoj, eĉ bonamikoj ... mia infanineto! Mi kutimis averti ŝin, ke ŝi ĉiam agu prudente. Sed tamen ... ho ve!

*S-ro*: (*iom severe*) Nu, do, mia konsilo estas, ke vi tuj informu la policon, ke via filino ...

*S-ino*: Ho, ne, ne! Ne la policon! Ĉar ni estas honestaj, ĉiam absolute honestaj ... nu, preskaŭ ĉiam, preskaŭ absolute ... Neniam ni havis rilatojn kun policianoj.

*S-ro*: Do, mi ne scias kion plu konsili al vi, sinjorino.

*S-ino*: Kaj mi ne scias kion plu konsili al mi mem ... ho ve!

*Virina voĉo, iom distance*: Ho, Panjo ... Panjo ...

*S-ino*: (*nekrede*) Kiu estas? Ne povas esti! ... Tamen ja estas Espero! ... mia infanineto Espero!

(*Almarŝas plenkreska junulino, eĉ grandega, alte kaj ĉirkaŭe. Ili reciproke ĉirkaŭprenas*).

*S-ino*: Ho, mia perdita infanineto!

*F-ino*: Tute ne! Mi ne estas perdita. Jen mi!

*S-ino*: Do, mia retrovita infanineto!

*F-ino*: (*komfortige*) Nun vi scias, Panjo, ke mi ne estas facile perdebla.

(*Dum la virinoj interparolas, la sin-*

*joro provas diri ion, malfermas la buŝon, sed ne povas trovi okazon paroli.)*

*S-ino:* Tamen mi timis kaj timis, kaj serĉis kaj serĉis ... Sed, diru, kio okazis al vi, infanineto mia?

*F-ino: (ekscite)* Ho, surpriziga afero ... ĝojiga afero ...

*S-ino: (timigite)* Vi ne edziniĝis ... aŭ fianĉiniĝis ... aŭ ...?

*F-ino: (petoleme)* Tute ne ... almenaŭ ankoraŭ ne ... Mi iris kun amikino, kaj ŝi prezentis min al siaj amikoj, la gesinjoroj Esperanto. Kaj mirige, mi trovis, ke ili estas parencoj niaj. Neniam mi antaŭe sciis, ke ni havis tiajn parencojn, Panjo.

*S-ino: (iom malŝate)* Ho, eble iaj boparencoj de via patro!

*F-ino:* Jes, verŝajne. Tre bonaj ili estas, Panjo. *(modestŝajne)* ... aparte iu junulo! Li estas bela kiel filmstelulo ... kaj li montris sin tre amika al mi. *(ridetas)*

*(La sinjoro sukcesis trovi okazon por ekparoli):* Nu, do, sinjorinoj, ĉar vi ambaŭ estas ree feliĉaj, mi petas permeson fari adiaŭon, ĉar vi ne plu bezonas helpon.

*S-ino:* Tamen, mi devas danki al vi pro via afableco sinjoro. Kaj eble

konvenus ke ni prezentu nin. Mi estas sinjorino Mondpaco, ĉi tiu estas mia filino Espero ... mia infanineto Espero.

*S-ro: (iom dubeme)* Vi estas sinjorino Mondpaco! ... kaj ĉi tiu estas via filino Espero! ... kiu perdiĝis, sed troviĝis ĉe parencoj Gesinjoroj Esperanto!

*S-ino kaj F-ino: (kune)* Jes, ja, tiel estas.

*S-ro: (gratas la kapon iom konfuze)* Sinjorino Mondpaco, perdinte la filinon Espero, retrovis ŝin ĉe Esperanto? ... ŝajnas al mi, ke tiu epizodo havas nuancon iomete alegorian!

*S-ino: (indigne)* Alegorian! Kia sensenca vorto, sinjoro. Mi vere estas sinjorino Mondpaco ... ĉi tiu vere estas mia infanineto Espero ... kaj ŝi vere trovis amikojn ĉe gesinjoroj Esperanto. Kian alegorion oni povas trovi en tio? *(prenas energie la brakon de la filino)* Ni foriru hejmen, infanineto. Ĉi tiu sinjoro ne kredas al ni. Eble mi eraris, kiam mi pensis, ke li estas ĝentila homo. *(ili formarŝas)*

*(La sinjoro postrigardas al ili konsternite. Subite li ridetas, ridas, laŭte ridegas.)* Ha-ha-ha! Ĉi tiuj virinoj! *(ankaŭ formarŝas)*

**INTERNACIA KRISTANA FRATARO**, estas organizo por Kristanismo, kiu utiligas Esperanton en internaciaj rilatoj kun siaj membroj kaj kunlaborantoj tra la tuta mondo. Estas konsilinde ke Esperanto-Kristanoj interrilatiĝu kun tiu frataro. La *IKF* sendas senpage al ĉiu, kiu sendas la afrankon, la jenajn libretojn: *La Evangelio laŭ Sankta Marko*, *La Evangelio laŭ Sankta Johano*, *Biblio-Partoj*, *La Kvakerismo* (mallonga raporto), kaj *George Fox* (bibliografio). Sendu respond-kuponon por afranko. Adresu: *Internacia Kristana Frataro, Livingstone Jenkins, Sekretario, 21 Mitchell Road, Palmers Green, London N. 13, England.*

**ESPERANTO-VERKISTO M. SOLOVIEV**, sendas gravan kaj urĝan help-peton al ni, de Jugoslavio. S-ro Soloviev ne povas havigi al si dolĉaĵojn, kiujn la kuracisto konsilis necesaj por li. Havante 72 jarojn, kun kormalsano, li petas ricevi iom da sukero, mielo, ĉokolado, aŭ dolĉa lakto. S-ro Soloviev verkis multajn poemojn, artikolojn, kaj tradukojn en antaŭa tempo — “*Esperantisto*” 1892-94, “*Esperanto Triumfonta*”, eĉ “*Krestomatio*” de Zamenhof. Li plene meritas nian helpon. Ĉu inter ni ne troviĝas bonkora samideano kiu sendos al li iom da dolĉaĵo? Adresu: *Mikael Soloviev, Laze Teleckog ul. 17, Novi Sad, Jugoslavio.*

# ESPERANTO-KRONIKO

*Grava Internacia Konferenco*, "Esperanto, Komuna Lingvo de la Unuigitaj Popoloj", okazos en Parizo dum Pentekosto 1948. Tiu konferenco konsistas el kvar komisionoj: politika, ekonomia, scienca, intelekta. Kvar preparaj komisionoj estos baldaŭ starigitaj. La celo estas por pruvi al la mondo la grandan praktikan valoron de nia komuna lingvo en ĉiuj kampoj. *Union Esperantiste Francaise* organizas la konferencon. Ĉiuj kiuj interesas pri aktiva kunlaboro, bonvole turnu vin al la Centra Oficejo.

*Esperanto-Ekspozicioj* okazis en diversaj lokoj en Usono: *S-ro J. E. Barton* aranĝis bonegan ekzpozicion en la Publika Biblioteko, Kearny, N. J. *Elmira Esperanto-Klubo* starigis ekzpozicion en la Alternejo Horseheads, N. Y. *Granda Ekspozicio de Fremdlingvaj Jurnalaj* troviĝis en la Centra Biblioteko de Nov-Jorko. *Fino Mary Marrett* raportis, ke specimeno de *Amerika Esperantisto* frapante vidiĝis en tiu ekspozicio, kaj "la verda stelo bele elstaris, ĝi tuj kaptis mian atenton!" *Francis Onderdonk* aranĝis ekspoziciojn en Birmingham kaj Royal Oak, Michigan. *S-ino Catherine Coss*, en San Francisco, kun helpo de membroj de la Esperanto-Societo de la Golf-Regiono, bele kaj sukcese prezentis Esperanton al la publiko en "Elmontro de Flankokupoj" de Banko de Ameriko.

*Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio* antaŭ nelonge fondiĝis kun fondantaj membroj en 21 landoj. Ĉefredaktoro *C. Hilmer Johanson, Östgöten, Linköping, Svedlando*, estas la Prezidanto. Sekretario estas *Redaktoro Einar Adamson, Värmlands-gatan 18, Göteborg, Svedlando*. Jurnalistoj inter niaj legantoj skribu al li! Fakaj kunvenoj por ĵurnalistoj okazos en la Universala Kongreso en Bern, Svislando, kaj en la SAT-Kongreso en Aarhus, Danlando.

*El Romo* *S-ro Peter Komuniecki*, pola studanto en la Papa Rusa Kolegio, raportas, ke numeroj de *Amerika Esperantisto* multe helpas lin en lia propaganda laboro, precipe "inter tiuj — ili estas tre multaj —, por kiuj ĉio valoras, kio estas skribita angle". *S-ro Komuniecki* konatiĝis kun AE per nia eminenta kunredaktoro, Pastro Gabriel N. Pausback, O. Carm., kun kiu li kunlaboris por Esperanto.

*La Verda Stelo estis* nomo, kun granda desegnita verda stelo, sur milit-aeroplano dum la milito. Pere de *D-ro H. Harris* ni ricevis du belajn bildojn de la aeroplano kun ĝia Esperantista anaro. Ili devenis de Aŭstralio, kaj laŭ la desegnitaj bomboj sur la flanko de la aeroplano, ili sukcesis pri 39 bomb-atakoj kontraŭ absolutismon.

*Dek-Unua Brazila Kongreso de Esperanto* okazos en Sao Paulo je 13a-21a Septembro. Aliĝintoj ricevos belajn memor-esperantajojn. Sendu vian kotizon por membreco al *Amerika Esperantisto*, \$1.75; aŭ rekte al *Brazila Ligo Esperantista, Praca da Republica 54, Rio de Janeiro*, brazilaj kruzeroj 30.

*Malnova Projekto por "Universala Lingvo"*, eldonita en Usono en la jaro 1829, estis malkovrita en Los Angeles de *S-ro Charles Chomette*. La aŭtoro de la projekto estis *James Ruggles*. Ĝi estis presita en Cincinnati, Ohio, 180 paĝoj, en angla teksto, kun gramatiko kaj vortaro en la projekt-lingvo. La titolo (el la angla): "Universala Lingvo, bazita je filozofiaj kaj analogaj principoj". La aŭtoro insistis pri ĝia klareco, simpleco, senvarieco, facileco, ktp. Ni vidu: "Bctzpxrps maghxrsmirzpxrpsdudkrctzdur, klas-hirnpxs hordzpxns gogsilspesgzdxrs" (*inter la grandaj benoj kaj mirindaĵoj de kreado, povas esti enklasisgita la reguleco de tempo kaj sezono*).

# ESPERANTO-KRONIKO

*Walter August Buchheim* raportas pri klopodoj por antaŭenigi la aferon en Denver, Colorado. Nova Prezidanto de la Esperanto-Societo de Denver estas *F. A. Nelson*. Juna skolto, *Howard Shipley*, esperas instigi la skoltojn pri lernado de la interlingvo.

*Viktoro Murajo*, antaŭa Kasisto de EANA, devis ekŝigi el la posteno, pro tio ke li translokiĝis. Lastatempe ni ricevis leteron de li en North Carolina, kun lia kutima kuraĝigo kaj bona monhelpo. Li skribis: "Mi esperas, ke mia malgranda helpo, kiun mi povis donaci dum mia servo, estis utila en la Esperanto-afero, pri kies lingvo mi daŭre havos intereson". La tuta Esperantistaro ŝuldas multon al *Viktoro Murajo* pro lia vere tre granda kaj kompetenta servado en la Centra Oficejo.

*Joseph R. Scherer* de Los Angeles vizitis Nov-Jorkon en Aprilo, kaj kunportis korajn salutojn de la *Esperanto-Klubo de Los Angeles*. S-ro Scherer helpeme vizitadis inter la Esperantistoj, kaj faris bonan paroladon kiel honorgasto antaŭ la kunveno de la Nov-Jorka Esperantistaro.

*La K. L. M. Uzas Esperanton*. La Nederlanda Aervetura Kompanio (KLM) komencis uzi Esperanton en sia informservo. Ĝi dissendis, al ĉiuj siaj oficejoj tra la mondo, publikigitajn tekstojn en Esperanto. Ni ĉiuj devas utiligi tiujn tekstojn por publikigo en la esperanta kaj nacilingva gazetaro. Ni petas la Esperantistaron kunlaboru en tiu afero, ĉar ĝi povos kaŭzi gravajn sukcesojn en la oficiala enkonduko de Esperanto ĉe la aviado. La tekstojn oni petu de *KLM, Sekcio Informservo, Raamweg 90, Den Haag*, aŭ de la KLM-oficejoj en la diversaj landoj. En Nov-Jorko, petu tekstojn de *KLM Royal Dutch Airlines, 29 Broadway, New York City*.

*Gravulojn meritas* "Amerika Esperantisto", ĉar ĝi nun estas 40-jara. La unua numero de AE aperis en Oktobro 1906 en Oklahoma City, kie ĝin fondis kaj redaktis S-ro Arthur Brooks Baker, kiu nun loĝas en Santa Barbara, Kalifornio, kaj fariĝos 70-jara en Aŭgusto 1947. AE estas la plej malnova Esperanto-gazeto nun aperanta en la Okcidenta Duonsfero kaj, se ni ne eraras, la dua en la tuta mondo inter la Esperanto-gazetoj aperintaj seninterrompe. La plej aĝa estas *The British Esperantist*, kiu fondiĝis en 1905. Kelkaj aliaj gazetoj nun aperantaj, ekz. *Espero Katolika* kaj *Esperanto de UEA* estas teorie pli aĝaj ol AE, sed ne aperis dum kelkaj jaroj kaj do estas vere "gazetoj revivigitaj". Ni intencas baldaŭ publikigi artikolon pri la fondo kaj historio de "Amerika Esperantisto". Ĝi eniras la kvinan jardekon de sia ekzisto kun kuraĝo kaj bona espero kaj invitas gratulojn en la formo de novaj abonoj kaj novaj membroj de EANA.

*La Esperantista Lingva Komitato*, kies rolo estas la kontrolo de la lingva evoluo de Esperanto, nun konsistas el 47 personoj, laŭ cirkulero de ĝia Prezidanto, J. R. G. Isbrucker, Hago. El la 103 membroj antaŭmilitaj (1938), 23 mortis aŭ estas mortigitaj, 10 ne estas troveblaj (kelkaj el ili sendube ankaŭ mortis), 15 ne respondis demandaron al ili senditan, 6 esprimis deziron ekŝigi, kaj kun 2 (japanoj) kontakto ankoraŭ ne estis ebla. Oni atendas pluan informon.

*EANA Ekzamenoj*: Profesoro Clarke raportas la jenajn sukcesintojn — *Atesto pri Lernado*; Harold S. Schroepel, Galesburg, Ill.; Mary Murray, Agnes M. Morris, Celia Thomas, ĉiuj de Portland, Oregon. *Atesto pri Kapableco*; (kun rajto de instruado) S-ino Anna Kincaid, Portland, Oregon; (kun honoro) Frederick L. Broening, Baltimore, Maryland.

# ESPERANTO-KRONIKO

*Esperanto-Societo de Detroit* daŭre sendas bonegan subtenon al EANA. En fresdata letero, *Joseph Murray*, vigla sekretario kaj sperta Esperantisto, sendis subtenon jene: tri subtenantaj membrecoj, du patronaj membrecoj, kaj dek donacabonoj al AE por dek bibliotekoj. Nian koran dankon, kaj gratulon pro bona laboro.

En "*Chemical & Engineering News*", 31an Marto, 1947, aperis artikolo pri la valoro de Esperanto al scienculoj, de la plumo de samideano *Charles H. Briggs*. La ĵurnalo estas la oficiala organo de la *Amerika Kemia Societo*.

"*Kiu Estas Kiu*", adreslibro pri Esperantistoj en Nord-Ameriko, laŭ informo de *F. A. Post*, aperos antaŭ la komenco de Novembro ĉi-jare. Ĝi enhavos duoblan nombron da nomoj ol pasintjare kaj estos presita tut-esperante. Pluan informon de *F. A. Post*, *R. F. D. 5, Box 606, Little Rock, Arkansas*.

"*The Case for Esperanto*", de *P. L. Wright*, estas bona broŝuro pri Esperanto, eldonita de la "World Unity" movado en Anglujo. Ekzempleroj estas haveblaj de AE po 15c.

*Claude Schaffner*, *New Haven, Conn.*, de tempo al tempo havas bonan sukceson pri enmeto de informo pri Esperanto en ĵurnalojn. Lastatempe *New Haven Journal-Courier*, 24an Majo, presis la tutan artikolon, "Esperanto Saved My Life!" (el AE), sendita de S-ro Schaffner al la kolumno "People's Forum". Tre imitinda ekzemplo por ni ĉiuj!

*Belaj Fotografiaĵoj Haveblaj* ĉe nia samideano *Joseph Leaby*. Via foto estas havebla en ia ajn mezuro. Sendu originalon aŭ negativon por havigi al vi belajn reproduktaĵojn, vi ricevos viajn sendaĵojn returne sendifekte. Petu ilustritan prospekton de *Joseph Leaby*, 1754 *Lanier Place, N. W., Washington 9, D. C.*

## ESPERANTISTOJ DE KANADO

*Fino Olive Latimer*, estas nun Prezidanto de *Toronto-Esperanto-Societo*. Laŭ informo de *W. D. B. Hackett*, Sekretario, oni aranĝis gajan kunvenon por bonvenigi *Pastron R. Edis Fairbairn* de *Windemere* (vidu Esperanto-farson, verkita de Pastro Fairbairn en ĉi tiu numero de AE). La jara pikniko de la societo estis festita en la hejmo de *Robert kaj May Kelly* en *Sheridan*.

En la *Universitato de London, Ontario*, troviĝas nova sed aktiva Esperantisto, *Raymond Canon*. Li serĉas kontaktojn kun aliaj samideanoj en tiu regiono. Konatiĝu kun li.

En *Hamilton, Ontario*, konstante kreskas la nombro da membroj en EANA. S-roj *J. H. Hartley kaj Edward Collins* kutime gvidas kursojn en tiu urbo.

*Danlandaj Esperantistoj vizitas Kanadon*. Konata samideano de Danlando, *Knud Hansen*, kun sia edzino *Hilde* kaj filineto *Inge*, vizitas en *Picton, Ontario*, ĉe la hejmo de pioniro-Esperantisto *Hugo Gerisch*. S-ro Gerisch estas la patro de S-ino Hansen. La Hansen-familio vizitis la *Centran Oficejon* dum veturo tra *Nov-Jorko* survoje al Kanado. La redaktisto de AE trovis, ke S-ro Hansen estis malnova kunulo en la *IEL Komitato* ĉe la *Berna Universala Kongreso, 1939*.

Ĉeestas la *EANA Kongreson* en *Conway, New Hampshire*, *Fino Olive Latimer*, de *Toronto*. Ni esperas preparoli ĉe la Kongreso pri ebla Kongreso en *Toronto, 1948*. Ni petas ĉiujn samideanojn en kaj proksime al *Toronto* pripensu pri aranĝo de la Kongreso en la sekvonta jaro.



## ESPERANTISTOJ EN GERMANUJO, ATENTU!



Ni serĉas informon pri *Kapitano Thomas M. Plesé*, kies foto aperas ĉi tie. Li estis Piloto en la Usona Armea Aerkorpuso. Lia aeroplano estis pafita kaj faligita super Mainz, Germanujo, 9 Septembro 1944. Estis 12 en la aeroplano. Ses saviĝis, kvin mortis, kaj la aeroplano estis trovita apud Mainz. La mortintoj estis identigitaj. La bombardisto, Leŭt. Joseph Risovich, estis enterigita ĉe Bausheim apud Russelnheim. Germana oficiro asertis ke Kapitano Plesé estis savita. Sed oni ne trovis lin. Eble li ankoraŭ vivas ie; eble li suferas amnezion. Ia ajn informo, bona aŭ malbona, estos dankeme kaj rekompense ricevita de la patro: *D-ro M. J. Plesé, St. Josephs, N. Y., Usono*. D-ro Plesé estas preta por iri al Germanujo, se konsilinde. Certé Esperantistoj pruviĝos helpemaj en klopodoj por trovi informon por la patro, Esperantisto ekde 1910, kiu ne povas trankviliĝi ĝis li lernas la sorton de sia sola filo. Sendu informon al *D-ro Plesé aŭ Amerika Esperantisto*.

We are searching for information about *Capt. Thomas M. Plesé*, whose picture appears on this page. He was a Pilot in the U. S. Army Air Force, and was shot down over Mainz, Germany, on Sept. 9, 1944. There were 12 in the crew. Six were saved, five were killed, and the plane was found near Mainz. Those killed were identified. The bombardier, Lt. Joseph Risovich, was buried at Bausheim near Russelnheim. It was stated by a German officer, that Capt. Plesé was safe. But he was never located. Possibly he is alive somewhere; possibly an amnesia sufferer. Any news, good or bad, will be appreciated by the father: *Dr. M. J. Plesé, St. Josephs, N. Y., U. S. A.* Dr. Plesé is ready to go to Germany if any clues are brought to light. Surely Esperantists will prove helpful in efforts to trace information for the father, an Esperantist since 1940, who cannot rest until he learns the fate of his only boy. Address: *Dr. Plesé or American Esperantist*.

## DEZIRAS KORESPONDI

*Kosto de anonceto: Eksterlande, 2 int. resp. kuponoj; Enlande, 5 cendoj por unu vorto.*

*Argentino.* F-ino Teofila Elortegui, 9 de Julio 710, Venado Tuerto (Santa Fe), F.C.C.A. Dez. kor. kun la tuta mondo per L kaj PK.

*Brazilo.* Liberal Francisco Carpini, Centro Telefonico Ararense, Araras S. Paŭlo. Dez. kor. kun Usonanoj.

*Bulgario.* S-ro Georgi P. Koraliier, grad. Peŝtera. Dez. kor. pri ĉiuj temoj. 21-jara.

*Bulgario.* S-ro Boris Kraster Stefanov, ul. Ilia Kuŝev, n-ro 6, Sofio IX. 21-j. studento dez. kor. pri botaniko, elektro kaj radio-tekniko.

*Ĉekoslovakio.* F-ino D. R. Podholova, Sladovnicka 6, Praha VIII. 18-j. dez. kor. pri lernejoj temoj.

*Ĉekoslovakio.* F-ino Vogelova Vera, Mor. Ostrava 19, Strojirna 593. Serĉas gekorespondantojn.

*Ĉekoslovakio.* S-ro L. Kopaĉ, Prazska 108, Trebiĉ. 17-j. komerca studento dez. interŝ. pk., fotojn, kaj informon pri la skolta movado.

*Ĉinujo.* S-ro Ŭan Giajn, N-ro 7. Ĝinlin Vilaĝo, Kŭaŝiba, Ĉengtu. 18-j. studento de ekonomio en Suĉuan Universitato, dez. kor.

*Ĉinujo.* S-ro Yung-Sen Yang, Chu Hsin Chen Banko, 18 Ming Chuan Rd., Chunking. Dez. kor.

*Franĉujo.* S-ro Jean Clement, 17 rue Victor Hugo, en Vierzon (Cher). Dez. interŝ. uzit. PM kun Ameriko.

*Germanujo.* Grupo de Ukrainaj Esperantistoj dez. kor. pri ĉiu temo kun ĉiulandaj samideanoj. Adreso: "Ukraina Esperantisto," Augsburg-Goglingen 13b, Bayern (U. S. Zone).

*Germanujo.* S-ro Friedrich Hahn, Beginenland 20, Bremen. Poŝtmark-kolektantoj! Mi sendas al vi bonajn poŝtmarkojn se vi sendas al mi iom da nutraĵoj.

*Hispanujo.* S-ro Jose Contreras Arguelles, Calle de Andalucia 11, Madrid. Dez. kor.

*Germanujo.* S-ro Horst Kliemann, Hugo-Preuss-str. 56, Hannover-Ricklingen, (Brita Zono). 18-j. junulo kaj junula grupo dez. kor. kun Amerikaj gejunuloj.

*Hungario.* Pastro Antono Lantos-Kiss, Sopron m., Magylozs. Katolika Pastro dez. kor.

*Hungario.* Stefano Kallay, Kossuth L. u. 38, Oroshaza VI-a gimnazio, skolto, PM kolektanto dez. kor.

*Hungario.* S-ro Lajos Kiraly, Pataky Sandor ter 2, Miskolc. Gimnazia profesoro en komerca lernejo, dez. korespondantojn por siaj lernantinoj 16-18 jaraj.

*Italujo.* S-ro Ad. G.S. Boscarino, Corso Vittorio Veneto 92, Ragusa. Dez. junajn korespondantojn por siaj lernantoj

*Japanujo.* S-ro Koji Sumiya, 211 Otorinakamachi 6-cho, Sakai-Urbo, Osaka-Pref. 22-j. universitata studento dez. kor. speciale pri sociologio, juro

*Nederlando.* S-ro Bas van der Wal, Mauritsstr. 125, Rotterdam. Dez. kor. per il. PK, kun la tuta mondo, escepte Brazilo, Eŭropo kaj Usono. Bonvolu glui PM bildflanke.

*Portugallio.* S-ro Josue Rodrigues Rosa, Rua Jose P. Padinha 12, Tavira, Algarve. Filatelisto, dez. kor. kun Nord-Amerikanoj.

*Svedujo.* Globa Klubo, Box 9, Umea 2. Dez. kor. kun la tuta mondo pri lingvoj, vojaĝoj, landoj kaj popoloj, literaturo, florkulturado, k.t.p., kaj interŝ. il. PK, PM, ĵurnalojn, librojn, florsemojn, k.t.p.

*Franĉujo.* F-ino Denise Eyzat, 44 Rue Giffard, Brive-la-Gaillarde (Correze). 20-j. fervojistino dez. kor. kun la tuta mondo.

*Aŭstrujo.* D-ro Ernst Goerlich, Messenhausergasse 4, Wien III Dez. kor. pri kulturaj kaj historiaj temoj.

## ESPERANTO BOOKS

*The Central Office is now equipped to supply all your book needs. When you buy books from "American Esperantist" all profits are used to give you a better magazine and a better E.A.N.A. Place all your book orders through "American Esperantist".*

ESPERANTO HOME STUDENT, James Robbie. Beginner's text for class or self-instruction. 64 pp., newly printed 14th edition.....	.25c
PRACTICAL GRAMMAR OF ESPERANTO, Dr. Ivy Kellerman-Reed. More complete beginner's text. 142 pp. (war-time edition), formerly .75c, now only	.50c
STEP BY STEP IN ESPERANTO, M. C. Butler. Excellent simple text with instruction and numerous exercises. 244 pp. ....Paper, .85c; Cloth,	\$1.25
A PRACTICAL COURSE IN ESPERANTO, Szilagyi. Illustrated text.....	.60c
ESPERANTO, G. Alan Connor & Doris T. Connor. (World Language Series, edited by Prof. Mario A. Pei). A practical introduction to Esperanto, and systematic phrase-book. 32 pp. ....	.65c
LANGUAGES FOR WAR AND PEACE, Mario A. Pei, Ph.D. Guide to languages of entire world, incl. <i>Esperanto</i> (see above). 663 pp. .... cloth	\$5.00
ESPERANTO GRAMMAR & COMMENTARY, by Major-General Cox. A complete analysis of Esperanto grammar, with helpful lists and examples. ..Cloth	\$2.00
ESPERANTO KEY (English). Esperanto in miniature. . . .10c; 3 for .20c; 10 for	.50c
EDINBURGH DICTIONARY, Eng-Esp and Esp-Eng, 288 pp, best concise dict..	\$1.00
AMERICAN POCKET DICTIONARY, Carl Froding. Esp-Eng & Eng-Esp. Beginner's pocket companion. 80 pp. (war-time edition) .....	.30c
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH DICTIONARY. 1942 edition. 490 pp. Cloth	\$3.50
ESPERANTISMO, I. Gomes Braga. Miscellaneous articles about Esperanto movement, in easy excellent Esperanto. Recommended for individual, class, or club reading practice. 32 pp. ....	.15c, 10 for \$1.00
TIPOJ KAJ ASPEKTOJ DE BRAZILIO, by the Brazilian Institute of Geography and Statistics. One of the most impressive books in Esperanto. 36 full-page illus., 151 pp., 7 x 10½ in., beautifully printed on deluxe paper. Bound in the following covers..... art paper \$2.00; flex. leatherette	\$3.00
10-in-1 DICTIONARY OF BASIC LANGUAGE, French, German, Spanish, Italian, Russian, Chinese, Japanese, Arabic, Portuguese, Esperanto, 10 languages, including Esperanto, in a nutshell, 110 pp. .... Paper .50c; Cloth	\$1.50
SEP VANGOFRAPOJ, Karlo Aszlanyi. Most recent novel of the "Epoko Series". Translated from the Hungarian. 145 pp. ....	.75c
"LIFE OF ZAMENHOF" (English) \$1.25. "VIVO DE ZAMENHOF" (Esperanto)	\$1.25
LA FINO, by Count Bernadotte, world best-seller, popular edition, paper .....	\$1.00
LINGVAJ RESPONDOJ, Zamenhof. A standard commentary, deluxe paper....	.75c
JOHANO KAJ SILVIO, Betts. A first reading book in Esperanto.....	.30c
THE LANGUAGE PROBLEM, Its History and Solution, E. D. Durrant. Highly recommended, complete treatise, with index. 168 pp. .... Cloth	\$1.50
"LA ESPERO" & "LA VOJO." Two separate Esperanto songs, with words and music for piano .....	.25c
INDIAN BEAD STARS. White background with green star in center.....	.75c
GREEN STAR. Metal, white edge, gold rim, fairly large, brooch or button....	.65c
ESPERANTO AT A GLANCE. Leaflets.....12 for .10c; 100 for .60c; 200 for	\$1.00

### YOUR MEMBERSHIP IN E. A. N. A. WILL BE APPRECIATED

Membership, with "American Esperantist," \$2.00 per year. Sustaining Member, annually, \$5.00. Patron Member, annually, \$10.00. Life Member, one payment, \$100.00. All memberships include "American Esperantist." Your membership in one of the higher brackets will greatly aid in the promotion of Esperanto in North America. Send your membership dues to:

**ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA**  
114 W. 16 St., New York 11, N. Y.

## INTERNATIONAL ESPERANTO BOOK CLUB LITERATURA KLUBO STELO-LIBRO

This *Esperanto Book Club* venture, Swedish Esperanto Publishing Society, deserves the support of every Esperantist. Excellent authors and titles, highest quality printing and binding, provide books which are outstanding.

Every several months a new book comes from the presses. Those who *subscribe to five consecutive volumes*, receive them at club-rate low cost, averaging about \$1.75. You pay after you receive them. Send AĖ your promise to take *five consecutive books*. Start with the following current titles now: *VIVO VOKAS*, Engholm, will be sent at once *members \$1.75*. *PRINTEMPO DE MORTO*, Zilahy (*to members Fall 1937*) Send in your *membership immediately to American Esperantist*, to be sure of receiving the excellent current book by Engholm.

---

### EXCELLENT INEXPENSIVE EANA BOOKS

*MISERERE KAJ THAIS*, two stories in one booklet: *Miserere* by Mabel Wagnalls (tr. by Edward S. Payson, in easy excellent Esperanto). This is a musical romance. *Thais* by Anatole France (Payson), 66 pp, original price 50c, now priced at only . . . . . 35c

*LA AKROBATO DE NIA SINJORINO*, remarkable legend originally published in French in very early times, author unknown. (tr. by Payson). Printed in two colors, ornamental brochure, art frontispiece of 'Madonna', 19 pp, only . . . . . 35c

*LA ROZUJO ĈIUMILJARA*, by Mabel Wagnalls: (Payson), with two beautifully printed photos of the author and the translator, 47 pp . . . . . 35c

*BLANCHE, LA VIRGULINO DE LILLE*, by Sarah H. Adams (Payson). With art frontispiece of classical bust, absorbing story of medieval life and love, 33 pp . . . . . 35c

*LANDO DE ARGENTA AKVO*, by Vingie E. Roe (Payson). Story of Western America, of life and love among the Indians and painted deserts, 48 pp . . . . . 25c

**Special Offer, all five booklets for only \$1.00**